Maurice Roelants,

Odoras floroj en ĝarden'

tradukita de Manfred Retzlaff

Dum la vesper' alproksimiĝas,
odoras floroj en ĝarden',
de la flugado lacaj jen
apenaŭ la birdar' moviĝas.

Konturoj ĉiuj malklariĝas,
la tag' foriĝas kiel flam',
laŭlonge de la arboj jam
nebuloj lante supreniĝas.

Forsinkas brilo en paleco,
sed trinkis lumon ĉiu flor';
mi sentas – venos mia hor' –
la spiron jam de l' eterneco

Traduko de la Nederlanda poemo "De bloemen geuren in de perken" de Maurice Roelants en Esperanton de Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2007-07.*

MR-462- / Arg-808-1621 (2013-02-01 09:39:04)